Frostavallen är belägen mitt i ett skänskt skogsparti vid en idyllisk liten sjö med badmöjligheter. Ett nytt, modernt hotell i fyra våningar med en ny föreläsningssal har färdigställt 1971. Hotellet är sammanbyggt med hittillsvarande Gästgården, som alltså finns kvar.

Programmet kommer liksom tidigare att bli av hög klass med föreläsningar, diskussioner etc. Men även underhållningsaftnar, utfärder m. m. finns med. Det definitiva programmet är ännu ej färdigställt, men bland föreläsarna återfinns Dr. Ivo Lapenna.

Kostnadsuppgifter och program sändes till alla, som begär upplysningar hos Jan Strömne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö. Alla intresserade bör snarast göra detta.

Svenska Esperanto-Institutet

ÅRHUS

La internaciaj feraj aŭtunaj Esperanto-kursoj okazos 17.—23. de oktobro en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Århus, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj en regiono kun aŭtunkoloraj arbaroj apud blua maro. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIS
Ingemannsvej 9
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

RECENZOJ

Werner Bormann, doctor scien-tiarum politicarum, docento por Esperanto en la Universitato de Hamburg:

BONA SANCO,

Stafeto-libro, 246 paĝoj, prezo Krj 28: 25 ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö.

Kiam ordinara esperantisto, kiu sin trovas inter la profundaj vicoj de la "pacaj batalantoj", trastudas verkon de lingvisto-sociologo-sciencisto, li tuj sentas, ke lia propra pozicio antaŭ la multfaceta problemaro de mondlingvo donas ĉefe nur "ranan perspektivon". La koncerna aŭtoro staras kvazaŭ sur altaĵo, havante pli vastan superrigardon, kaj tiu "altaĵo" estas lia scienca eduko, lia altevoluinta scio pri la temo. La dirita sento aperis ankaŭ al la recenzanto, dum li traegis la novaperintan Stafeto-libron "Bona Sanco" (n-ro 70 inter volumoj ĝis nun eldonitaj sub tiu marko), verkitan de d-ro Werner Bormann. La verko konsistas el entute 12 prelegoj faritaj antaŭ diversaj medioj (kongresoj aŭ konferencoj kc. en Fed. Resp. Germanujo aŭ alilande). Ili estas titolitaj: "Eŭropo kaj ĝia lingva problemo", "Esperanto en la lernejoj", "UNESKO — Jaro de Internacia Kunlaboro", "Situacio kaj ŝancoj de Esperanto en la nuna fazo de la evoluo", "Situacio kaj ebloj de la Esperanto-movado", "Sciencaj obstakloj por internacia lingvo", "Internaciaj rilatoj kaj internacia lingvo", "Mondtrafiko kaj mondlingvo", "La scienca pritraktado de Esperanto (Esperanto kaj interlingvistiko)", "80 jarojn Esperanto", "Homaj rajtoj kaj lingva diskriminacio" kaj laste "La oficiala enkonduko de Esperanto". Krom la cititaj prelegrubrikoj estas 3 aldonoj: "Reguloj pri la lingvouzo en Eŭropaj unuigoj", "Diskutoj pri Esperanto en la germana radio" kaj "Eta rezulto de granda provo".

Kvankam — kiel la aŭtoro mem konfesas — pro la karaktero de lia libro, kies ĉapitroj estas nombro da prelegoj verkitaj por diversaj eventoj inter la jaroj 1961—1969, la enhavo iomgrade difuze pritraktas la bonajn ŝancojn de nia lingvo, oni tamen absolute rimarkas la ruĝan fadenon kunligantan la diversajn ĉapitrojn-prelegojn. Tiu fadeno estas firma kredo pri unu sole ebla solvo de la mondlingva problemo, kiu je matura tempo devas venki. Pri la scienca precizeco oni ne rajtas dubi, kaj ĉiu esperantisto, kiu serioze volas esplori la pozicion kaj ŝancojn de Esperanto, estas nepre preta atesti, ke la libro estas vere leginda en ĉiuj tavoloj de nia movado.

En sia prologo Ernesto Sonnenfeldt kredas, "ke prave la du d-roj

Bormann (patro Artur kaj filo Werner, la aŭtoro) ripetas la atentigon, ke interlingvistiko kiel scienco devas okupiĝi pri ĉiuj aspektoj de la internacia lingvo". Se estu al la recenzanto permesite aldoni sian propran modestan rimarkon, li volus tamen almontri, ke unu flanko ŝajnas esti preskaŭ preterlasita de la aŭtoro, nome la rolo de Esperanto kiel faciliga kaj raciiga faktoro en la ĝenerala lingvoinstruado en lernejoj aŭ aliloke, kvankam ĝi apenaŭ povas esti malgrava. Eĉ se oni malsukcesas komprenigi al homoj blindaj por la esenca tasko de konstruita, internacia lingvo (ĉar ili dubas pri ĝiaj kapablo kaj ŝancoj iam ludi tian esencan rolon en la mondo), oni povus kiel komenca paŝo al pli kreskanta kompreno ĉe la publiko pri la valoro de Esperanto tamen montri al ĝia jam spertita kvalito kiel baza lingvo por plua lingvolernado. Fakte ja pruvita per oficialaj eksperimentoj i. a. en Britujo kaj Finnlando, sed bedaŭrinde tro malmulte konata. Ĉu ne estus tasko de sciencistoj kaj pedagogoj en la Esperantomovado instigi la aŭtoritatojn de pli multaj landoj komenci, daŭrigi kaj plivastigi tiajn eksperimentojn kaj poste decidi laŭ la donitaj rezultoj?


Nepa konkludo de leginto de "Bona Sanco": la lingva kaoso en interpopola kunvivado fariĝis dum la lastaj jardekoj konstante pli kaj pli komplika anstataŭ pli simpla, kiel multaj homoj, eĉ erudiciuloj, imagas al si. Ĉu ne devas tamen iam foriri ĝi la blindiga vualo de antaŭ iliaj okuloj, por ke ili klare vidu ke reale troviĝas nur unu racia — sed radikala — solvo de la kreskanta problemo? Tiu solvo, kies nomo estas Esperanto. La dek du prelegoj plus tri aldonoj de d-ro Werner Bormann certe konvinkas pri tio dubemulojn en kaj ekster la kadro de nia movado esperantista.

Kaj la diligenta Stafeto-eldonisto J. Régulo Perez, La Laguna, Kanariaj Insuloj, estas denove alte dandinda pro ĉiuj valora eldono.

Kogo

LA PLEJ AKTUALA LIBRO de Leander Tell: "Estiĝo de la tero kaj de la homo" prilumas la nebulan vojon ek de la plasmaj ĝis la planedoj.

Niaj konoj pri la formiĝo de l'planedoj el la nebulozo estas tre nebulaj. Tial la tuta mondo streĉe sekvis la lastan esplorvojaĝon de l'amerikaj astronautoj al la luno. Kaj ni retenis nian spiron pro timtremo pri ilia viva reveneblo. Ĉu ili sukcesos surakviĝi-reteriĝi? Ĉu ili sukcesos porti malsupren sian unikan trovaĵon? Jes, ilia vivrisko ne vanis, la kuragegan provon kronis grandioza sukceso: ili kunportis 80 kilogramojn da pramaterio de la luma-luna planedo, kies



Leander Tell.

analizo analoge helpas solvi la misteran problemon de nia tera formiĝo.

Ni gratulas la lertan eldoniston, Prof. D-ron J. Régulo en La Laguna, Tenerife, kiu, en la kadro de Beletraj Kajeroj eldonis nun ĉi gravan popularsciencan verkon ilustritan, ampleksanta 124 paĝojn. Jam pli frue li eldonis verkon de la sama aŭtoro, **Leander Tell**, kiu enkondukis nin en la speleologion (t. e. malkaŝis la misterojn de la grottoj) per "**La bela subtera mondo**".

Komence de lia nuna verko nin orientigas antaŭparolo de norvega fakulo, D-ro C. Støp-Bowitz. Poste ni ĝuas la vive pentran kaj facile digesteblan stilon de Tell, kiu nun vastigas ne nur niajn speleologiajn sciojn, sed ankaŭ tiujn pri geologio kaj arkeologio.

Ni legas multfacetajn teoriojn pri la naskiĝo de la astroj el gasonubo, ja ne nur teoriojn, ĉar sciencaj opinioj ĉiam pli kaj pli faktiĝas per trovo de pramaterioj, kiuj konfirmas la formiĝon de niaj planedoj en la mondspaco antaŭ 4—5 miliardoj da jaroj.

Ni sciiĝas — vorte kaj bilde — kiel "oni" naĝis-rampis en la komenco de l'komencoj. Kiel la prahomo elvenis el la subteraj grottoj. Kiel li rampadis sur kvar piedoj. Kiel leviĝis sur du piedojn. Kaj rektiĝis. Altiĝis — ankaŭ spirite — kaj kapabliĝis per mirindaj gravuraĵoj sur grotaj muroj eternigi, por ni, nuntempoj, sian tiaman vivmanieron.

Por atingi ĉion ĉi — kaj multe pli, multe pli — la 75-jara aŭtoro — kun mirinda fizika kaj psika forto (li ja ofte devis mem rampi subteren, vadi tra akvo, rampvagi tra mallumaj grottoj) konstatas, ke "rampinte en sen-nombrajn grottojn, mi eĉ povas diri, ke ni nuntempe konas multajn prahomojn pli bone ol niajn vivantajn najbarojn. La praulojn ni konas eĉ en iliaj ostoj. Persone mi ofte renkontis ilin..."

Povas daŭri jarojn ĝis kiam fakuloj analizos la lunajn trovaĵojn de l'amerikaj astronautoj. Sed vi jam nun povas ekstudi la gvidlibreton en la pramondon, se vi ekzemple mendos ĝin de Eldona Soc. Esperanto en Malmö je la malalta prezo de 15: — svedaj kronoj kun imposto. **T. M.**

Eĉ sen legi, nur turnante la paĝojn oni ekmiras pri la granda koncentriĝo de valora enhavo, pli ol 50 plenŝtopitaj paĝoj. Gvidas la paradon Waringhien per sia prelego pri la giganta laboro krei vortaron. Unika artikolo. Certe ĝi vekas indan respekton pri la impona tasko kaj donas imagon pri la problemoj kaj malfacilaĵoj, same pri la kvanto de energio necesa.

Pli ol 10-paĝa informado pri Parizo donas amason de klara, interesa scio, sufiĉa materialo por tuta libreto. Tamen agrable flua priskribo sen karaktero de enciklopedia kondensaĵo.

Aperas diversteme Shakespeare, Marx kaj Montessori. Kontribuas Raymond Schwartz. La vicon finas plurpaĝa citaĵo el aperonta, aktuala verko pri konstrua planado de regionoj kaj urboj.

S. A. J.

**HORIZONTO DE SOVETA LI-
TOVIO.** Dua kajero (1971). So-
cieto de Amikeco, Esperanta
Sekcio, Kostiuŝkos 36, 232000
Vilniuss, Litova SSR.

Volonte oni bonvenigas la duan ka-
jeron de tiu nun verŝajne establita
periodaĵo. Dum la postmilita tempo
ne abundis informoj pri Esperanto el
tiu parto de Eŭropo. Des pli konten-
tigitaj nun montriĝas ke Esperanto bone
progresas en la Balta regiono, evi-
dente pro serioza kaj efika penado.
Speciale atentinda estas la raportado
pri la kursa aktiveco en diversgradaj
lernejoj. Verŝajne konsiderinda pro-
greso, same la ioma uzo de Esperanto
en radio.

La enhavo de tiu-ĉi dua kajero es-
tas entute bonkvalita kaj interesa.
Menciinda inter alie la daŭrigo de
la artikolo "Riĉeco de Esperanto
kompare kun naciaj lingvoj."

S. A. J.

TIBOR SEKELJ:

"TRA LANDO DE INDIANOJ"

Pri esplor-vojaĝo en la
tropikajn arbarojn de
Mato Grosso — regiono
malofte vizitata de
blankuloj.

Prezo kun imposto,
bros. 28: 25, bind. 35: 30.

Fack, 200 42 Malmö 7
Postgiro 578-5

LA VULTURO KAJ KAPREOLO

De Ionel POP

Iun majan matenon mi staradis en la enirejo de valo, kiu etendis sin al la piedoj de montaro Fagaras. Ankaŭ je tiu ĉi okazo miaj malbonaj intencoj rilatis al kapreolo, kiu kutimis paŝti ĉiloke la bongustan herbaron. Kiam komencis taglumigi mi rimarkis kapreolon paŝtantan en la mezo de bela herbejo. Ĝi estis kapreolo belkreska. Mi priatentis longtempe ĝian paŝtadon trankvilan. Ĝi apenaŭ levis, de temp'al tempo, la nazon. Tagiĝis. Subite mi rimarkis en la aĉro grandan birdon kiu faris larĝajn cirklojn, kaj mi tuj rekonis la vulturon. Mi ĝojis vidi tiun ĉi birdon, la plej majestatan ĉe ni, kiu iĝis ankaŭ en nia montaro malofte kaj sekvis kun admiro ĝian egalmezuran ŝvebadon. Post kelkaj rondflugoj, je mia surprizo, mi vidas, ke ĝi duone kunfal-
das la flugilojn, farante ilin kubutformaj, etendas antaŭen siajn vestitajn piedojn, mezuradas per la okuloj kaj rapide falflugas kiel sago rekte al la kapreolo.

Ĉu estas eble? La vulturo kuraĝas ataki ne nur kapridojn, sed eĉ kapreolojn plenkreskajn? Sed ne ekzistis ia ajn dubo. La kapreolo rimarkis la atakon, kaj kiam la rabobirdo estis preskaŭ atinginta ĝin, ĝi fulmrapide leviĝis je siaj malantaŭaj piedoj, atingante preskaŭ staton vertikalan kaj direktis al la vulturo frapon per la du antaŭaj piedoj, kvazaŭ per du marteloj. Samtempe eligis timkrion, lastmomente ŝirmis sin per turniĝo bone konata de ĉasistoj. La vulturo,

subite, kaj per la sama svingo suprenleviĝis, ne plu farante ian ajn cirklon, atakis refoje de alto ĉirkaŭ 25-metra. Sekvas la sama defendo flanke de kapreolo, per la antaŭaj piedoj. Al mi ŝajnis mirinda la precizeco per kiu la kapreolo sciis en momenta tempero altenleviĝi je siaj malantaŭaj piedoj kaj direkti frapojn al la rabobirdo. Se ĝi estus malfruanta eĉ nur iomete, tiu ĉi estus enpŝonta siajn ungegojn kaj atingonta ĝin fortege per sia beko. Sed en la stato vertikala, frapante per la piedoj, la kapreolo ne povis stari longtempe. Do ĝi devis altenleviĝi en la plej lasta momento. Kaj ĝi faris eĉ tiel. La sama sceno ripetiĝis ankoraŭ dufoje, la vulturo ne povis atingi sian rabajon. La kapreolo laŭvide estis morte timigita. Ĝi atendis kun teruro la novan atakon, rigardante al la malamiko, evidente timis ekmoviĝi, kurante ja ne estus povinta sin defendi. La vulturo povus ĝin subpremi, antaŭ alveno en la densan arbaron.

Post la atakoj malsukcesaj la vulturo sidiĝis en la proksimeco sur la supro de fago. En la sama momento la kapreolo forsaltis kaj per dekdek kvin salto malaperis en la densaĵo. Post kelkaj momentoj, la birdo altenflugis, transen de flanko plej alto, verŝajne por kontentigi eĉ je rabajo pli modesta.

El la rumana tradukis

Eugenia Morariu

RICEVITAJ LIBROJ

LA KONSUMKOOPERADA MOVADO EN SVEDUJO,

de John Lundberg, eldonita de KF, Internacia Servo, Box, S-104 65 Stockholm 15. (1971)

BUDHISMA KATEKISMO

Eldonanto: Budhana Ligo Esperantista, Rue des Fagnes 19, B-4131 AWIRS, Belgujo (1971).

GERIATRIO KAJ LA ĜENERALA ZORGO POR GEMULTJARULOJ

de Schreuder kaj Diatlowicki-Tobi. Tradukis Faulhaber. Eldono de F.L.E. (1971?).

KOMUNLINGVA NOMARO DE EUROPAJ BIRDOJ

Nomenklatura Komisiono de la Ornitologia Rondo Esperantlingva. Eldonis: Esperanto Press, Cardiff, Ontario, Kanado (1971).

LA TURMENTEGO DE LA MEMMORTIGINTOJ

de Almerindo Martins de Castro. Tradukis Benedicto Silva. Eldonis Brazila Spiritisma Federacio (1970).

ANTAŬ DUMIL JAROJ

de Francisco Cândido Xavier. Tradukis Porto Carreiro Neto. Eldonis Brazila Spiritisma Federacio (1951).

★

PIPPI LÅNGSTRUMP PÅ ESPERANTO

Astrid Lindgrens barnboksuccé kommer sannolikt inom kort i esperantoutgåva. Direktör Erik Carlén har redan börjat översätta boken sedan utgivningsrätten erhållits av INTER i Göteborg. Det är inte helt klart vad "Pippi Långstrump" skall heta på esperanto, men troligen blir det "Pinjo Longastrumpo".

AKTIVA KLUBO

Dum preskaŭ 40 jaroj Skövde estis verda loketo sur la mapo esperanta. Sajnas ke — same kiel Zamenhof per sia spirito ekipis fortan vivkapablon al sia lingvo — ankaŭ la patro de nia klubo, Emil Falk, herede lasis al ĝi similan econ. Ĝi ĉiam havis ian propran vivon kaj bonŝance posedis fervorajn talentulojn. Tial eĉ en ĝenerale malfavoraj tempoj la klubo bone konservis sian bazan forton kaj evitis minacon de malkresko aŭ vegetado.

Dum la lastaj jaroj tiu "propra vivo" de la klubo forte manifestiĝis. La aktiveco kaj la ĝenerala kvalito de la membraro kreskis ĝis la nuna esperiga kulmino. Al tiu bona progreso kontribuis kompreneble ankaŭ energia kaj celkonscia penado de la ĉefaj aktivuloj. Per senpera varbado ili sukcesis konstante havigi adeptojn por novaj kursoj — ne grandnombre sed des pli grave de bona kvalito. Tiel aliĝis al nia klubo lastatempe areto de kompetentuloj. Por la interna firmigo de la klubo efike servis vico de specialaj aranĝoj, al kiuj certaj klubanoj dediĉis grandan, eĉ ofereman laboron. La kunlaboro en la distrikta kadro estis pli regulece daŭra ol antaŭe kaj rezultis inter alie en komunaj aranĝoj kaj regionaj ekskursoj.

Interesa ekzemplo pri la aktiveco de nia klubo montriĝas en la vendado de literaturo. Eble oni rajtas konsideri tiun statistikon unika por nia lando. La ciferoj de la lastaj jaroj aspektas jene: 1968 — 1 152 kr, 1969 — 764 kr kaj 1970 — 963 kr. Krom la sumo de 1970 la komunuma biblioteko en Skövde aĉetis per la klubo esp.-literaturon sume de 541 kr. Specialan respekton al tiuj ciferoj aldonas la fakto ke la vendoprezoj estis ĉefe netaj. Kompreneble tia rezulto ne aperas senkaŭze kaj per si mem. Ni dankas ĝin sole al la konstanta kaj senlaca agado de la klubanoj Ruth kaj Bengt Alsén. Tiu penado nepre postulas imitadon, ĉar ĝi atestas pri la ebleco vendi literaturon por ebligi novan kaj daŭran eldonadon. La kvalito kaj kvanto de la eldonado estas gravega afero por Esperanto, ĉar ĝi montras al la ekstera publiko la valoron de la lingvo kaj pruvas ke Esperanto vere estas viva lingvo. Do — temas pri serioza klubo tasko.

Same kiel pasintjare anoj el nia klubo vizitis eksterlandan klubon. Komence de majo pasintjare ok klubanoj veturis al Turku. Pri tiu sukcesa ekskurso ni ankoraŭ kontente memoras. La amikeca akceptado, la valora programo kaj la instigaj impresoj pli ol rekompencis la perdon de multa dormo...

Ĉi-jare ni dum Pentekosto vizitis s-anojn en Ŝwinoujŝcie, nun kun dek-

ana karavano. Eĉ por la jam spertaj "polemuloj" la restado en Ŝwinoujŝcie estis forta pruvo pri la sincera, bonkora pola gastamo — sed al la iniciuloj ĉio aperis preskaŭ nekredebla. Inter alie la grupeto de Ŝwinoujŝcie aranĝis tuttagan aŭtobusekskurson al la wolinaj urbetoj — ĉio senpaga por ni: veturo, enirbiletoj, tagmanĝo... Vere oni ofereme zorgadis pri nia bonfarto kaj ŝarĝis nin per donacoj ĉe la foriro. Tio-ĉi preskaŭ similas al malnova orienta fabelo, sed vere temas pri aktuala eŭropa realeco (do, inter esperantistoj). La varma amikeco instigis nin al starigo de daŭra kontakto kaj kunlaboro. Certe tio estos ambaŭflanke utila rilato.

Sekve ni kontentas pri nia nuna situacio kaj krome ni atendas rezultojn de la aktiveco dum la venonta sezono kaj ĝojas pro bona espero pri la estonto. La nuna maniero de la interna kaj ekstera agado de nia klubo ŝajnas per sia silenta sed energia kaj rekta agado prezenti efikan metodon, speciale konvena por la lokaj cirkonstancoj.

Cc.

Generale ni ne povas publikigi tro longajn referaĵojn pri la agado de la kluboj, sed se ili estas tiel verkitaj, ke ili povas doni al aliaj klubgvidantoj sugestojn kaj ideojn ni kredas, ke ili meritas lokon en nia gazeto. Ĉi tiu raporto el Skövde bone montras, kion povas fari ankaŭ relative malgranda societo en ordinara urbo. Ni ŝatus ricevi similajn raportojn ankaŭ el aliaj lokoj.

La red.

PROPONOJ

Mi proponas, ke oni en La Espero havu iun "Libera Angulo" kie ni havos la eblecon diskuti pri nia movado, laŭdi kaj mallaŭdi. Tiel ni povus plibonigi nian agadon per novaj ideoj kaj proponoj.

Mia sperto estas ke la publiko ne scias ion pri Esperanto. Se iu havas imagon pri ĝi, ĝi ofte estas erara. Ni devas ion fari. Ni bezonas novan propagandilon, kiu per malmultaj vortoj kaj sufiĉe bona aspekto allogas la homojn kaj informas ilin pri Esperanto. Kiu faros?

Kaj vi esperantistaj lingvistoj, ĉu vi ne povus kompili novan poŝvortaron, kies enhavo estu pli ampleksa sed formato pli malgranda ol tiu de la vortaro de Vilborg?

Gravas ankaŭ modernaj lernolibroj, se ni volas interesigi niajn gejunulojn en la lernejoj. Se ni ne povas montri al ili, ke Esperanto estas taŭga rimedo por la estonteco, ni ne povos gajni ilin en nia angligita Svedujo.

Gunnar

(La "libera angulo" estas decidita. Mankas nur la kontribuoj. Ekskribu! La redaktoro.)



Forpasis
nia kara samideano
MAGDA
BOHMAN-CARLSSON
poetanima instruistino
en sia 76-a jaro.
Ŝi ripozu pace!

La enteriga soleno okazis la
11.9.71 en la Misia Preĝejo de
Rimbo.

En nia venonta numero aperos biografiaj kaj bibliografiaj datoj, ankaŭ eldiroj de la geamikaro de Magda Bohman.

La 27-an de julio mortis unu el la plej malnovaj esperantistoj en Danlando, nome **Holger Hansen, Holbaek**.

Jam dum la lerneaj jaroj en Odense li esperantiĝis kaj restis fidela al Esperanto ĝis sia morto kaj estis unu el la eminentuloj en la dana esperantomovado. En 1927 li fondis la esperantoklubon en Holbaek, kies prezidanto li estis ĝis antaŭ 3 jaroj, kiam li pro malsano devis sin retiri.

Dum multaj jaroj li estis direktoro por la Vespera Lernejo en Holbaek, kaj dum tiuj jaroj li ĉiujare aranĝis kaj gvidis esperantokursojn. Multaj estas tiuj, kiuj tiamaiere konatiĝis kun esperanto, kaj sekve de tio plialtiĝis la membrocifero de lia klubo, kiu fariĝis unu el la plej eminentaj en Selando.

Holger Hansen iam ankaŭ estis gvidanto de la "Leterlernejo", kaj tiamaniere li diskonigis nian lingvon. Li kunlaboris kun konataj esperantistoj i. a. f-ino Margrete Noll kaj aranĝis prelegvojaĝon en Danlando por profesoro Bujwid. Kaj li mem en sia juneco biciklis en Eŭropo kaj kontaktis multajn samideanojn. — La esperantomovado bezonas tiajn ardatajn laborantojn.

Li ripozu en paco!

E. A.

Ingeborg Björkstrand, Sundsvall, forpasis, 72-jara. Ŝi estis vidvino de Edvard Björkstrand, kiu estis unu el la fondintoj de Amika Rondo en Sundsvall.

Helge Ericsson, alia veterano en Sundsvall, mortis antaŭ nelonge, 73-jara. Aliĝis al Amika Rondo jam en 1930 kaj tre aktive laboris por nia movado.

LA JUBILEA KONGRESO DE SAT

La kongreso de la 50-jara Sennacieca Asocio Tutmonda okazis en Orsay apud Parizo, kie la kongresanoj kunvenis, manĝis kaj dormis en la studenta urbo ĉe la Scienca Fakultato. Partoprenis 530 personoj el 21 landoj.

La solena malfermo okazis dimanĉe la 1-an de aŭgusto en Parizo mem, en la Universitato de Sorbono. Prezidis profesoro G. Waringhien, kiu rakontis pri la historio de la loko. Saluti diversaj reprezentantoj de neesperantistaj organizaĵoj, inter ili multaj pacistaj organizaĵoj kaj Socialista Partio Franca. Dum la ĝeneralaj kunvenoj okazis viglaj diskutoj kaj krome okazis multaj fak- kaj frakcikunvenoj.

Pluraj distraj vesperoj estis aranĝitaj. Marde la kongreso ekskursis per ok aŭtobusoj al Reims kaj reveture oni vizitis la ĉampankelojn de la firmo Mercier en Epernay. La vicprezidanto de la Konsilantaro de la urbo Parizo oficiale akceptis la kongreson en la Urbdomo de Parizo.

Okazis du prelegoj: prof. Waringhien parolis pri la skribarto kaj s-ro Röllinger pri prahistoriaj homoj.

Infankongreso kun 30 geknaboj okazis.

La SAT-kongreso 1972 okazos en Kuopio, Finnlando, dum la tempo 22—28 de julio.

Gejunuloj!

Ni planas aranĝi veturon tra la mondo per traktoro kun dometo sur tirata vagono. Ek de majo 1972 dum unu jaro. Lokoj por ses personoj. Por informoj skribu al Kajetan Pyzyski, ul. Zamenhofs D. S. 2, Poznan, Pollando.

KORESPONDI DEZIRAS

Polo deziranta lerni la svedan lingvon (esperantisto).

S-ro Kazimierz Derlacki,
ul. Solec 28 m. 25
WARSZAWA 1

22-jara ministro:

Hobioj: pm, bildkartoj, mineraloj.

Manfred Kirsch,
August-Bebel-Str 9,
6506-RONNEBURG, DDR

F-ino Valentina Njagolova, str. Kiril i Metodij 59 a, SUMEN, Bulgario (27-jara gimnazia instruistino).

S-ro Curt Freitag (fotografisto),
Lychener Str. 54, 1058 - BERLIN, DDR.

★

Prunto kaj prunto

Cu ŝajnas al vi prudente prunti cent kronojn al persono, kiun vi apenaŭ konas, kaj rifuzi prunti dek kronojn al mi?

— Jes, vin mi konas.

Brevmärke - Portland

Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40

3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

LA POSTKONGRESO EN BARLASTON

La vivo en Esperantujo daŭris ankoraŭ unu semajnon, post la kunestado en London, sed en pli intima formo. La UK finiĝis la 7-an de aŭgusto kaj poste sekvis kelkaj pli malgrandaj postkongresoj diversloke. Mia edzino kaj mi partoprenis veturon al Barlastono, en grupo kiu estis limigita je 45 pro loĝigeblecoj. La semajno estis tre sukcesa.

Nia gvidanto en la postkongresa veturo, sinjoro H. Barks, vokis per la rendevua tabulo en la kongresejo "siajn ŝafidojn" kolektiĝi en la fervoja stacidomo Euston en Londono por okupi rezervitan vagonon en la trajno al Stoke-on-Trent. En Stoke atendis aŭtobuso, kiu kondukis nin al Barlastono, kie ni loĝis en Wedgwood Memorial College. Post kelkaj tagoj ni estis kvazaŭ granda familio.

La programo estis tre varia sed ne tro laciga. Inter la ekskursoj la plej memorinda estis tiu al Jodrell Bank kie ni vidis la grandan teleskopon, per kiu oni povas observi la satelitojn. Grave estis ekkoni la regionon ĉirkaŭ Stoke-on-Trent kaj iom pri ĝia historio. Tre memorinda estas la akcepto en la urbodomo de Stoke. La urbestro bonvensalutis, verkistino Marjorie Boulton parolis, granda infanĥoro kantis en Esperanto. La urbo regalis nin per kafo.

Karl Härnqvist

OBS!

MA-medl. av UEA får under hösten vid ett tillfälle 2 ex. "Esperanto". Låt icke extraexemplaret ligga oanvänt.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

57-a UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto



29 juli—5 augusti 1972
PORTLAND (Oregon) USA

blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Ryttmästaregatan 12, 217 52 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/12 1971	Till 31/3 1972	Till 20/6 1972	Efter 20/6 1972
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	150:—	165:—	180:—	218:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	128:—	143:—	158:—	195:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	105:—	120:—	135:—	173:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	105:—	116:—	126:—	164:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	90:—	100:—	111:—	148:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	45:—	50:—	54:—	92:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	75:—	83:—	90:—	128:—
8. Blindul(in)o	60:—	66:—	72:—	110:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen. Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen
Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 15 sv. kr. (poŝtĉeka konto 20 12).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanenco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm



Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 15 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr ö. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,
126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

Bertil Akerberg, Lillsvägen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Ulla Luin (sama adreso)

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78